

# Svisa Esperanto-Societo informas

**2000 numero 1-a: januaro / februaro**

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto : <gacond@bluewin.ch>

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

## Ĝenerala Kunveno je la 8a de aprilo 2000 en Luzern

Ni petas vin, rezervi tiun ĉi daton. Laŭstatute la Ĝenerala Kunveno traktos la devigajn punktojn pri la societa vivo en la jaro 1999: agadraporton, jarkalkulon, buĝeton, ktp.

Denove okazos elektoj, ĉar la trijara mandato finiĝas.

**Proponoj al la Estraro aŭ al la Ĝenerala Kunveno estu senditaj ĝis fine de februaro al la prezidanto: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen.**

Rendevuo por aktivuloj antaŭos la ĝeneralan kunvenon en la formo de publika informhoru pri esperanto en la germana lingvo, por eksteruloj kaj esperantistoj.

La detalaj dokumentoj aperos en la numero 2000-2 de nia organo *Svisa Esperanto-Societo informas*.

Nome de la Estraro: Bruno GRAF, prezidanto.

# Ĉe niaj najbaroj

## Aŭstrio

Aŭstria Esperanto-Movado, Margaretengürtel 100/11/2, AT-1050 WIEN, ĵus eldonis tre praktikan kaj facile konsulteblan poŝvortareton, kiu titolas *Wörterbuch Deutsch-Esperanto & Esperanto-Deutsch*. Tiu praktika 30-paĝa libreto etformata kostas 4 eurojn. Ĝi indas troviĝi inter la libroj proponataj al esperantolernantoj.

## Francio Strasbourg

### 47a Praktika Staĝo de parolata esperanto

Sabate 1-an kaj dimanĉe 2an de aprilo okazos kultura semajnfino, kiun ni konsilas al la studemaj svisoj. Ĝi okazos en la centro C.I.A.R.U.S 7, rue Finkmatt, FR-67000 Strasbourg, atingebla de la stacidomo per la busoj 10 aŭ 20, haltejo "Place de Pierre" Informoj.

#### Programo de la semajnfino

##### Sabaton 1an de aprilo:

13h30: Akceptado.

15a-18a: Ludoj por infanoj kun C. GALLEGO.

15a - 18a Kursoj kaj Seminario

A. Komencantoj kun E. LUDWIG.

B. Praktikantoj kun E. GROSSMANN.

C. Konversacia kurso kun P. Denis kaj A. HUBERT.

D. Seminario **Esperanto radiografiita** kun Claude GACOND.

18h00: Libroservo kaj esperanta muziko kun JEFO.

19h00: Vespermanĝo.

20h30: Koncerto de M<sup>o</sup>rice BENIN, kiu kantas unuafoje 2 aŭ 3 kanzonojn en esperanto!

#### Dimanĉon 2an de aprilo:

8h30: Matenmanĝo.

9h00: Kursoj kaj Seminario.

12h30: Komuna tagmanĝo.

Interesatoj petu la detalan informilon rekte al Claude GACOND.

## Italio

*L'Esperanto*, la revuo de Itala Esperanto-Federacio dediĉis sian oktobran numeron de 1999 al la publikigo itallingva de artikoloj de Claude PIRON, Brian MOON kaj Aldo GRASSINI kun resumoj en esperanto pri la temoj *La Rajto komuniki* kaj *Komunikado en Eŭropo: idealo kaj realo* kaj *La komunikaj bariloj*. Ne estas dubo, ke la diskonigo de tiu revunumero en la itallingvan Svislandon povus atentigi intelektulojn kaj aŭtoritatojn pri la menciitaj problemoj kaj pri la seriozeco de esperanto.

# Vivo de SES

## Venu al Bern la 12an de februaro

Ni invitas vin al kunveno, dum kiu ni diskutos vizian projekton, pore kaj kontraŭe, kiu tuŝas emocie la aktivan movadon en la lasta tempo. Temas pri la koncepto de la Esperanta Civito, kiu volas doni strukturon al la esperanta komunumo. Sed kion ĝi vere celas? Ĉu ĝi estas bezonata? Al kiu ĝi utilas aŭ malutilas?

La estraro de SES traktis la temon kaj deziras koni la opiniojn de interesataj membroj. Jen okazo por informiĝi kaj esprimiĝi. Bazaj informoj kaj dokumentoj aperis en *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto*.

**Kie?** - Hotelo National, Hirschengraben 24, Bern, dua etaĝo, eniro tra la hotela pordo.

**Kiam?** - Sabate 12an de februaro 2000, 10h30-15h30.

**Kiel?** - Antaŭtagmeze d-ro **Giorgio SILFER** prezentos la projekton de la **Esperanta Civito**. S-ro **Bruno MASALA** komentos ĝin per kritika lupeo. Poste okazos ĝenerala diskuto.

Posttagmeze prelegos s-ro **Bruno MASALA** pri la temo **Tutmondiĝo kaj kulturo**. Jam la Universala Kongreso de Berlin studis tiun ĉi temon. Vidu la revuon *Esperanto*

Bruno MASALA loĝas en Metz (Francio), instruas en mezlernejo retorikon, literaturon kaj la latinan lingvon. Li studis klasikan beletron, filozofion kaj kristanan teologion. Li estas 32jara, lernis esperanton antaŭ 15 jaroj kaj aktivas en la kultura societo OSIEK.

Por kovri kostojn ni fiksas etan kotizon de CHF 10.- pagotan surloke per dek-franka monbileto.

Pro organizaj kaŭzoj ni petas antaŭanoncon per la aldonita karto.

Antaŭdankas Bruno GRAF, prezidanto de SES.

## La prezidanto komunikas

### Instruantoj de esperanto atentu

Kiom da kursoj okazis, kiom da interesatoj lernis esperanton dum la jaro 1999. Svisa ILEI-Sekcio kaj SES ŝatus scii tion. La nombro da kursoj kaj da lernantoj estas grava indico pri la ŝancoj de esperanto en nia lando. Tial ni enketas pri tiu stato kaj petas ĉiujn instruistojn kaj instruantojn respondi laŭ jena skemo:

- Nomo kaj adreso de la persono, kiu instruis esperanton.
- Nivelo de la kurso: enkonduka, progresiga, literatura.
- Nombro da lecionoj kaj daŭro.
- Nombro da lernantoj.
- Uzita metodo aŭ lernolibro.
- Kiel vi trovis interesulojn?

Bonvolu sendi vian respondon ĝis fine de februaro al la prezidanto: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. Ni sendos al vi la rezulton de la enketo. Koran antaŭdankon.

### Kun rabato de 20%

Kiam vi staras antaŭ libro-stando, vi ĉiam konstatas, ke la prezoj de la esperantaj libroj

estas altaj, pro la eta merkato kaj la limigitaj eldonkvantoj. Profitado je la sekva rabato, kiun SES peras.

UEA vendas iujn librojn kun tri-ona rabato ekde tri ekzempleroj. Unuopulo apenaŭ povas profiti je tiu ĉi rabato, sed societo, kiu organizas la vendadon. SES peras la jenajn librojn kun rabato de 20%.

**Esperanto: lingvo, literaturo, movado** de Pierre JANTON, funda analizo pri la lingvo kaj historio, enkonduko al la esperantologio. Prezo: CHF 10.

**Al lingva demokratio**, eldonita de UEA en la esperanta, angla kaj franca lingvoj. Aktoj de la NITOBE-Simpozio de Internaciaj Organizajoj, Praha, 20-23 julio 1996. Tiu verko enhavas gravajn ĉapitrojn pri lingvopolitiko kaj lingva praktiko, lingvodiverseco kaj lingva demokratio, lingvoj en transnacia edukado. Prezo: CHF 12.50.

**Pajleroj kaj stoploj** de William AULD, eseoj, rakontoj, tradukoj, libro-kulturo; tekstoj, kiuj havas valoron pli ol nur efemeran. Tre bela grafika prezento, eldonita honore al la 50-jariĝo de la esperanta verkado de William AULD en 1997. Prezo: CHF 23.

...kun **siaspeca spico** de Raymond SCHWARTZ, humura rakontaro, kiu plaĉas kaj maloftas. Prezo: CHF 16.50.

**Vivo de d-ro L. L. ZAMENHOF**, en bildoj, fotolibro. Prezo: CHF 16.50.

**La nova realismo** de Bruno VOGELMANN, filozofia pensado, mondkoncepto sen dogmoj kaj ideologioj, komuna religieco por kredantoj kaj ateistoj. Prezo: CHF 16.50.

La indikitaj prezoj estas jam rabatitaj. SES ne ĉerpas profiton serve sia membraro. Limdato por mendoj estas je la 29a de februaro 2000 al la peranto Anĝelo MELLINI, sekretario, Büntacher 21, 5626 Hermet-schwil. ☎ 056 633 33 85.

Via prezidanto: Bruno GRAF

## **Kotizoj/abonoj 2000** **Alvoko de la kasisto!**

En tiu ĉi eldono de *SES informas* vi trovas kiel kutime enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon por 2000. Mi afable petas, ke vi faru tion kiel eble plej rapide kaj ne pli malfrue ol fine de junio 2000!

Bonvolu nepre ĉiam indiki sur la enpagilo, kion vi pagas, do ekzemple:

"Kotizo 2000" aŭ "Abono 2000" aŭ "Donaco".

La kotizo inkludas abonon al *Literatura Foiro* (LF) kaj al *SES informas* (SESi).

CHF 12.- infanoj ĝis la 18a jaro  
25.- gejunuloj ĝis la 29a jaro  
70.- ceteraj membroj  
100.- geedzoj  
45.- emeritoj, pensiuloj  
65.- geedzoj emeritaj  
1400.- dumvivaj membroj  
900.- dumvivaj membroj emeritaj  
25.- abono al SESi sen SES-membreco.

Tutkoran dankon pro baldaŭa pago!

La kasisto: Elisabeth LAUPER.

## **Donacoj**

La SES-kasistino Barbara POCHANKE dankas pro la sekvaj donacoj por SES en CHF:

Arthur BAUR: 20, David BÜHLMANN: 30, Tazio CARLEVARO: 20; Verena CHAVES-WALDER: 80; Marguerite JACCARD-BESSON: 50; Lucienne DOVAT: 20; Odette FREGONARA: 30, Furio GABBRIELLI: 30; Walter KOBELT: 35, Jean-Jacques & Elianne LAVANCHY: 5, Ivo PEDUZZI: 30; Dieter ROOKE: 21.50; Heinz SANDMEIER: 40, Henri WETTSTEIN: 50.

# Movada vivo

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro  
pri la Lingvo Internacia

**Biblioteko de la Urbo**

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
Ø 032 967 68 55.

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

### Raporto pri 1999

En 1999 katalogiĝis 499 novaj libroj kaj broŝuroj. Tiu riĉiĝo de la CDELI-kolektoj rezultas el la donacemo de eldonejoj, de redakcioj, de donacintoj kaj de esperanto-verkistoj. Ni speciale menciuj Claude PIRON, kiu, okaze de translokiĝo de Coppet al Gland, decidis donaci al CDELI parton de sia libraro kaj de siaj arkivaĵoj. Temas pri grava kolekto interalie de romanoj originalaj ofte kun dediĉo de iliaj aŭtoroj kaj de revuoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj. Tazio CARLEVARO ankaŭ donacis parton de sia dokumentaro interlingvistika kaj alportis al CDELI librarojn hereditajn de la poeto kaj esperantisto Dante BERTOLINI (1911-1998) kaj de la itala Occidentalisto TACCONI. Lucerna Esperanto-Societo donacis sian bibliotekon, el kies libroj multaj venis kompletigi mankojn en la

biblioteko mem de CDELI, interalie koncerne lernolibrojn kaj vortarojn germanlingvajn kaj verkojn iel en rilato kun la katolikismo. Multaj dokumentoj ankaŭ riĉigis la kolekton da libroj perkoresponde prunteblaj. Anita ALTHERR en Genève kaj Trieste donacis leteraron, kiun sendis al ŝi la poeto Henri VATRE (1908-1998).

SES alportas daŭre gravan kontribuon per interŝanĝo de sia organo *Svisa Esperanto-Societo informas* kun revuoj de aliaj esperanto-organizaĵoj. Inter la aliaj societoj kontribuintaj al la riĉigo de la kolektoj de CDELI estu ankoraŭ aparte menciitaj KCE en La Chaux-de-Fonds, UEA en Rotterdam kaj "Gesellschaft für Interlinguistik" en Berlin. Sed abundas aliaj donacintoj de po kelkaj libroj, revuoj, korespondaĵoj aŭ arkivaĵoj, kiujn ni ne povas listigi, sed al kiuj ni ankaŭ vikle esprimas la dankemon de CDELI.

Ĉiu memoru, ke eĉ la plej sen-signifa dokumento en rilato kun esperanto, interlingvistiko aŭ lingvaj problemoj povas havi gravan signifon por la kolektoj de CDELI. Interalie ni alvokas, por ke ĉiu vikle kunlaboru al la kolektado de gazet-artikoloj menciantaj esperanton aŭ lingvajn problemojn. SES ne estas plu abonanto de Argus. Tial

ni riskas nenion scii pri multaj artikoloj. Kiuj sendas artikolon, tiuj bonvolu ĉiam klare menciigi ĝian aperdaton kun la preciza nomo de la koncerna gazeto kaj seeble la adreson de la redakcio.

La CDELI-laboron efektivas helpemuloj. Claude GACOND dediĉas al ĝi po dudekon da horoj semajne kaj venas lin helpi matene la merkredon lia edzino Andrée GACOND, kiu registras la periodaĵojn kaj katalogas librojn, kaj lia bofratino Cosette SANDOZ, kiu registras la alvenaĵojn. Ni menciigu, ke aliaj kunlaboroj ĉiam atendas plenumontojn. Helpemuloj pretaj transpreni funkcion estas bonvenaj kaj diversaj taskoj efektiveblaj surloke aŭ hejme atendas ilin. Sindonemuloj ne timu sin proponi.

Ni memorigu, ke en 1999 mortis du gravaj kunlaborintoj de CDELI. Gabrielle GACOND (Neuchâtel), la patrino de Claude GACOND, kiu mortis la 21an de aprilo en sia 91a jaro, komencis sian aktivecon por CDELI en 1968 kaj ĝin daŭrigis ĝis en la printempo de 1998, venante ĉiusemajne po unu plenan tagon por ordigi gazetartikolojn. La adepto de la lingvo Occidental Alphonse MATEJKA (La Chaux-de-Fonds), kiu mortis la 27an de oktobro en sia 98a jaro, ankaŭ komencis sian helplaboron kaj donacemon en 1968. Tiam redaktoro de la revuo

*Cosmoglotta*, li estis en rilato kun ĉiuj tendencoj interlingvaj. Tio klarigas la riĉecon de lia arkivaro, kiun li alportis kaj registris semajnon post semajno ĝis la jaro 1984, kiam li devis retiriĝi en la hejmon L'Escale. Per siaj poliglotismo kaj konoj koncerne al la naturalismaj tendencoj li certe larĝe kontribuis al la mondfamiĝo de CDELI.

En 1999 CDELI-n vizitis esplorantoj venintaj el Bulgario, Germanio, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando, Slovakio, Usono, kaj ankaŭ el Svislando mem.

Per la vendo de brokantaĵoj (libroj kvaroblaj kaj revunumeroj duoblaj) formiĝis fonduso, kies celo estas la akiro de la perkomputila kataloga sistemo Gesbib (Gestion de Bibliothèques, Strasbourg), kiu ebligas eldoni *Bibliografion de Esperanto kaj Interlingvistiko per la kolektoj de CDELI*, kiu estos interrete konsultebla. Donaco de CHF 1'9811.30 de Esperanto-Societo Neuchâtel per ties prezidanto Alfred Wenger venis riĉigi tiun fonduson deponitan en Banque Coop, kiu atingis CHF 2'395.35 la 31an de decembro 1999. Bruno GRAF promesis, ke SES subvencios tiun aĉeton, kiam ĝia prezo estos precize konata. Aliaj donacoj estos bonvenaj.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

## Svisa ILEI Sekcio

François Randin: prezidanto  
Vallombreuse 14, 1004 Lausanne  
☎ kaj fakso 021 647 29 17  
Retpoŝto: <ilei.ch@esperanto.nu>

### Ĝenerala asembleo

Neuchâtel

Sabaton 27an de novembro 1999

La kunvenon de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) afable gastigis la gepatroj de Mireille GROSJEAN en Neuchâtel. El la 16 SIS-membroj ĉestis Claude GACOND, Mireille GROSJEAN, François RANDIN kaj Jean-Thierry VON BUREN kaj la observantoj Bruno GRAF, Paule VUILLEUMIER kaj Jordan VELIKOV.

Senkulpiĝis Tazio CARLEVARO, Lucien DAHAN, Alain FAVRE, Nancy FONTANA, Claude PIRON, Nicole MARGOT, Christiane SIXTUS-POT.

La prezidanto François RANDIN malfermis la kunvenon je la 11h00 per lego de demisia letero de Tazio CARLEVARO. Mireille GROSJEAN transprenis la tag-prezidantecon.

La tagordo kaj la protokolo 1998-1999 estis akceptitaj.

Artikolo de Mireille GROSJEAN aperis en *Schweizerische Lehrer-Zeitung* kaj baldaŭ aperos en

*L'Éducateur*. SES aldonis anoncon.

Bruno GRAF informiĝos pri la esperanto-kursoj okazintaj kaj okazantaj en Svislando. KCE regule anoncas kursojn paralele al siaj kunvenoj. Claude GACOND reverkas la perkorespondan kurson por franclingvanoj. Bedaŭrinde la perkoresponda kurso de KCE por germanlingvanoj ĉesis funkcii.

KCE organizas la ekzamenojn en ligo kun SES.

La jarkotizo al Svisa ILEI-Sekcio, kiu inkluzivas tiun al ILEI kaj abonon al ĝia revuo *Internacia Pedagogia Revuo* restas senŝanĝa pro kontentiga financa situacio.

La vidbenda kurso *La Familio Bonvolo* akirita de François RANDIN ne uzeblas, dum la vidbenda kurso *Mazi* de Internacia Esperanto Instituto en Hago (Nederlando) estas utiligebla kun sukceso. El ĝi ekzistas pruntebla kolekto ĉe CDELI.

Mireille GROSJEAN raportas pri sia partopreno en la Universala Kongreso en Berlin kaj poste en la ILEI-Konferenco en Ĉeĥio, kiu alektis Claude GACOND kiel honoran membron. Ŝi avertas, ke pro sia aliĝo al la Universala Kongreso en Tel-Aviv ŝi ne povos ĉeesti la venontan ILEI-Konferencon en Bouresse (Francio) inter la 15a kaj la 22a de julio 2000. Ŝi esperas, ke ano de SIS



povos ĝin ĉeesti kiel delegito kaj voĉdonanto.

François RANDIN informas pri la esperanto-ekpozicio, kiun li pretigas por prezento en "Ecole Club-Migros" de Lausanne en februaro aŭ marto 2000.

La kunveno konkludiĝis je la 12h30 per komuna pikniko kaj venonta estas antaŭvidita por oktobro 2000.

## Didaktikaj Studsabatoj

En la privata lernejo "La Grande Ourse" en La Chaux-de-Fonds lanĉiĝis por la tria fojo instruado de esperanto. La instruistino Vera ZASLAWSKI petis didaktikan helpon al Claude GACOND. El tio rezultis unua studsabato organizita sub la aŭspicio de Svisa ILEI-Sekcio, kiu grupigis 8 interesatojn la 11an de decembro.

Dua studsabato dediĉita al la por franclingvanoj kompleksa temo **IGI-IGI** okazis la 22an de januaro ankaŭ kun 8 partoprenantoj venintaj ne nur el la neŭŝatela regiono, sed eĉ el Genève kaj Fribourg. Nova studsabato okazonta la 19an de februaro dediĉos sian atenton al la tre aparta partecipa sistemo de esperanto. Ĉiuj instruantoj kaj esperantostudentoj estas bonvenaj. Interesatoj rekte petu la detalan anoncon skribe aŭ telefone al Claude Gacond.

# K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds.**

Ø kaj fakso: (032) 926 74 07.

Retpoŝto:

<kce.esperanto@bluewin.ch>

## Venontaj aranĝoj

Jen la antaŭvidita kultura programo de KCE por la unua duono de la jaro 2000:

**Januaro 29-30:** Fabrizio PENNACCHIETTI kaj Giorgio SILFER: Interlingvistiko kaj esperantologio kiel universitataj studobjektoj + mezgrada studrondo.

**Februaro 12** en Bern kunlabore kun SES: Bruno MASALA kaj Giorgio SILFER debatos pri la naskiĝonta Esperanta Civito.

**Februaro 19-20:** François DEGOUL: Kio estas bela poemo? + mezgrada studrondo.

**Marto 25-26:** Stano MARĈEK (Slovakio): Kuraci sin per plantoj. + mezgrada studrondo + vespero kun ges-roj ROBINEAU.

**Aprilo 15-16:** Asembleo de KCE kaj Omaĝo al Yvonne MARTINOT per aro da prelegoj pri literaturo, historio, sociologio, didaktiko kaj muziko.

**Majo 27-28:** Ĉina semajnfino kun gastoj de Ĉina Akademio de Sciencoj.

**Junio 24-25:** Zofia BANET FORNALOWA: zamenhofologia semajnfino dediĉita al la familio Zamenhof + teatra vespero.

Ni memorigas, ke ekde la pasinta jaro la apogantoj de KCE ricevas detalajn sciigojn pri la aktiveco de KCE per rubriko publikigita en *Heroldo de Esperanto*.

## Universala Esperanto-Asocio

Sonja BRUN, ĉefdelegito kaj kongresperanto por Svislando.  
Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.  
☎ 041 790 46 40.  
Retpoŝto: <smbrun@freesurf.ch>

Sonja BRUN sendis al ni tiun ĉi komunikon kun siaj bondeziroj pri sano, feliĉo kaj prospero por ĉiuj en la jaro 2000:

*Mi esperas, ke ĉiuj membroj de UEA ricevis mian leteron kun la invito por la renovigo de sia membreco. Se iu ne ricevis ĝin, li bonvolu kontakti min. Mi memorigas, ke la kotizoj devus esti pagitaj antaŭ la fino de februaro, alimaniere la alsendo de la revuo "Esperanto" ĉesos.*

*Por la Universala Kongreso en Tel-Aviv la aliĝoj ne abundas ĝis nun. Mi ŝatus kuraĝigi ĉiujn*

*profiti pri tiu okazo viziti Israelon. Estas allogaj programoj por la kongreso mem, kaj speciale por la antaŭ- kaj post-kongresoj. Niaj israelaj samideanoj multe klopodas por montri al la esperantistoj sian landon multflankan historie kaj geografie. Ĝi estas juna kaj moderna ŝtato.*

Sonja BRUN

## Grupa vivo

### Basel

#### Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel  
☎ 0049 76 214 57 12  
Kunvenoj: 20h00 en Restoracio  
Weiherhof, Neuweilerstr. 107

### Monataj kunvenoj

**Januaro 27:** Ĝenerala jarkunveno.

**Februaro 24:** Skrablo-ludado.

**Marto mardo 14:** Renkontiĝo ĉe Claraplatz antaŭ SBG je la 19h30: "Gugge und Gässle".

**Marto 23:** Vizito de la Internet-Centro DataComm ĉe Steinentorstr. 11 je la 20h00.

## La Chaux-de-Fonds

### Studa rondo ĉe CDELI

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND aŭ alia instruanto

#### Datoj de la venontaj kunvenoj

Januaro 26, februaro 9 kaj 23, marto 8 kaj 22. Dum aprilo estos paŭzo.

La grupo da studemuloj kontentige progresas kaj ĉiuj fariĝas vigle aktivaj parole kaj ankaŭ invitante konatojn eklerni esperanton. Tiel novuloj alvenas por ankaŭ provi paroli en esperanto. En decembro honore al Zamenhof ni legis la unuajn principojn de lia *Deklaracio pri Homaranismo* kaj tradukante tiujn tekstojn ni konstatis kiom originalaj kaj avangardaj ili estis kaj restas. Dum la unua kunveno de januaro, kies dato devis esti ŝanĝita, bild-ludo paroliga kondukis al amuza babilado inter la partoprenantoj.

Janina JARECKA, POZNAN, Rynek Lazarslu 9/15 (Pollando) **deziras korespondi** kun svis(in)o! Ŝi havas 56 jarojn, estas vidvino. Ŝia edzo estis advokato kaj mortis pro kancero. Ŝi estas emerita konstruteknikistino. Ŝi havas filon 27-jaran, kiu estas pentristo, kaj patrion 87-jaran. Ŝin interesas diversaj

problemoj de la mondo. En 1966 ŝi partoprenis la UEA-kongreson en Budapeŝt, en 1967 ŝi vizitis Jugoslavion, en 1968 Parizon kun parencoj el Germanio, en 1969 geamikojn en Bulgario. Nun ŝi ne vojaĝas plu! Kiu respondos al ŝi?

## Genève

### Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20  
☎ 022 740 04 45

Monatkunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio « *Les Cheminots* », 7, rue des gares, Genève

### Raporto

En la informilo *Brasikfolio* ni legis, ke la 7an de decembro Yvonne kaj Armand COTTON, kiuj iom hazarde lernis esperanton en 1964 kaj 1969, rakontis pri la riĉigo, kiun alportis al ili esperanto-kongresoj. Kaj ke la 4an de januaro Mireille GROSJEAN prelegis pri la temo *Vojoj al bona interkompreniĝo*. Pertelefone ni aŭdis, ke 12 simpatiaj samideanoj ĉeestis tiun aranĝon.

### Monataj kunvenoj

**Februaro 7:** Monata kunveno.

**Marto 7:** Ĝenerala Asembleo.

Madeleine STAKIAN akcidentiĝis kaj devis kuracigi sian ŝultron en la hejmo Jolimont. Bonan resaniĝon nome de SES!

## Lausanne

### Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

Ø: (021) 729 58 02

E-mail: <lausanne.ch @ esperanto.nu>

Homepage: <<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, 20h30

Diskuta rondo: ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental : 18h00-20h00.

La *Informilo* de Laŭzana Esperanto-Societo fariĝis grafike pli kaj pli okulfrapa. Kiel multaj modernaj reklamiloj ĝi simpligas la anoncojn al minimumo. Tio taŭgus, se apude aperus raportoj pri la okazintaĵoj en alia organo. Tiu raportilo povus estis *Svisa Esperanto-Societo informas*, se LES-ano havigus al ni la koncernajn tekstojn. Sed ho ve! Preskaŭ nenio atingas nin, krom la anoncoj de la okazintaĵoj kaj kelkfoje ĉoj el la plej sukcesaj aranĝoj.

Tamen pri la zamenhofa festo per la decembra ĝeneva *Brasikfolio* kaj per telefona alvoko ni scias, ke ĝi kunvenigis tridekon da personoj venintaj ne nur el la laŭzana regiono, sed ankaŭ el Genève, Alemanio kaj eĉ Rumanio kaj Bulgario. Sub la gvidado de François RANDIN la historio de la 80jara Laŭzana Esperanto-Societo estis skeĉforme prezentita de Jacqueline VASSEROT, Ivette GOY, David BÜHLMANN kaj Jacques kaj

Lucienne DOVAT kun akordiona akompano de Claude BLANC. Filmis la aranĝon Pierre-Henri VASSEROT.

## Monataj kunvenoj

**Februaro 7:** Ĝenerala asembleo.

Sekvos kunvenoj je la **6a de marto, 3a de aprilo, 8a de majo kaj 5a de junio.**

Ekskurso okazos je la **18a de junio.**

Kaj aŭtune la renkontiĝo okazos je la **4a de septembro, 2a de oktobro, 6a de novembro kaj 10a de decembro** kun Zamenhofa festo.

## Luzern

### Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Ø 041 280 46 12.

**Kunvenoj:** ĝenerale ĉiun duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

## Raporto

1999 estis por la anoj de Lucerna Esperanto-Societo sufiĉe vigla jaro. Krom por la ĝenerala kunveno la LES-anoj renkontiĝis 8 fojojn. Sub la gvido de Franz BRÜGGER la kunvenoj komenc-

iĝas ĝenerale per duona horo dediĉita al perfektigo lingva.

Dum unu el la vesperaj kunvenoj, kies stud-temo estis literatura, venis redaktorino de *Neue Luzerner Zeitung*, kaj sekve al ŝia vizito tuta gazeta paĝo estis dediĉita al esperanto sub la titolo *Utopie der Wörter*.

Speciale plezurigaj estis la intersocietaj kontaktoj, kiel veno de gasto el alia societo aŭ partopreno de LES-anoj al zamenhofa festo ĉe aliaj grupoj. Devus okazi pli da tiaj intergrupaj kontaktoj.

La aŝiŝo-distribuo okaze de la agotagoj 1999aj streĉis la societajn fortojn. Teama aktiveco sukcesis informi pri esperanto en librotikoj kaj lernejoj.

Franz BRÜGGER, pro translokiĝo en pli malgrandan loĝejon ne povis plu konservi ĉe si la grupan bibliotekon, kaj ĉar neniu alia LES-ano povis ĝin transpreni, kun bedaŭro tiu libraro estis donacita al CDELI. Sed ĉiu medalo havas du flankojn: la koncernaj libroj, kiuj riĉigis la kolekton de CDELI, estas nun prunteblaj perkoresponde per la servoj de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

## Programo 2000

Antaŭ la pritakto de la kunvenaj temoj ĉiu aranĝo komenciĝas per paroliga duonhora gvidata de Franz BRÜGGER.

**Januaro 20 je la 14h00:** Konatiĝo kun esperanto-gazetoj kun Sonja BRUN.

**Febŭaro 12:** LES-anoj partoprenos en Bern la kunvenon, kiun SES dediĉos al la temoj Esperanta Civito kaj Tutmondiĝo kaj kulturo. Kaj **la 18an je la 20h00:** okazos la Ĝenerala Kunveno de LES.

**Marto 16 je la 14h00:** Ludoj kaj enigmoj kun Franz BRÜGGER.

**Aprilo 8:** LES ricevos SES-n por ties Ĝenerala Kunveno. Kaj **la 27an je la 20h00:** Sciindaĵoj pri kantado, muziko kaj instrumentoj kun Paul SCHERER.

**Majo 18 je la 20h00:** Travivaĵoj kun ĉevaloj kaj azenoj kun Monika RUCKLI.

**Junio 15 je la 20h00:** Kio kaj kiaj estas vespertoj kun Annelies DETTLING.

**Julio 8:** okazos ekskurso sub la gvido de Louise BACHMANN.

**Aŭgusto 24:** okazos promenado kun Sonja Brun.

**Septembro 21 je la 20h00:** Konsiloj de samaritanino kun Margrit SCHERER.

**Oktobro 19 je la 14h00:** Edukado de infanoj en esperanto kun Dieter ROOKE.

**Novembro 16 je la 14h00:** Kompilo de la programo 2001 kun Paul SCHERER.

Krome je ĉiu unua merkredo de la monato ĝenerale okazas paroliga kunveno kun Franz BRÜGGER

inter la 14h00 kaj 16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstrasse 39. Tiuj aranĝoj okazos je la 2a de februaro, 1a de marto, 5a de aprilo, 3a de majo, 6a de junio, 5a de julio, 6a de septembro, 8a de novembro, 6a de decembro kaj 3a de januaro 2001.

Laŭ la espero de la LES-anoj la publikigo de tiu programo 2000 instigu kelkaj kontakt- kaj vojaĝemulojn al renkontiĝo kun LES-anoj.

## Wil

### Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil  
☎ 071 911 68 30

**Kunvenoj:** 19.00 en la Restoracio  
Blumeneck, Sântisstr. 1

### Pri la kluba vivo

Pro renovigo de la restoracio Schweizerhof, nia multjara renkontejo, kaj pro ŝanĝo de ĝia posedanto, ni devis trovi novan kunvenejon. Malgraŭ tiu malfacilaĵo ne interrompiĝis niaj monataj renkontiĝoj kun esperantlingva programo. Ilin partoprenis po 7 ĝis 10 personoj. Ĝis marto 1999 ili ankoraŭ okazis en la restoracio Schweizerhof, aprile ni kunvenis en Flawil en la tibeta restoracio Gemsli kaj ekde majo ni retrovis kunvenejon en Wil mem. Ĝi estas

la restoracio Blumeneck situanta tuj apud la stacidomo, ĉe Sântisstrasse 1.

### Bela ekskurso

La 4an de julio sinjorinoj Verena CHAVES-WALDER kaj Sieglinde STAMM organizis migradon al Rappenlochschtuch en Dornbirn, Aŭstrio. Tiun belegan kaj neforgeseblan ekskurson partoprenis 14 personoj. Koran dankon al la organizintoj.

### Ekster la klubo

Klubanoj vizitis la ĉisekvajn neklubajn aranĝojn. 1 klubano partoprenis la laborkunvenon de SES en Bern je la 6a de marto. La SES-Tagojn en Zürich je la 15/16aj de majo ĉeestis du geklubanoj. La interregionan kunvenon de SES en Genève je la 23a de oktobro vizitis du geklubanoj. Kaj en Berlin 1 klubano ĝuis pri la 84a Universala Kongreso.

### Monataj kunvenoj

Je la 5a de januaro nia unua kunveno de la jaro 2000 okazis en la flegodomo Sonnmatt en Niederuzwil, kie nia longdaŭre aktiva klubano Ernst VON MAY trankvile revenas al plena sano post apopleksia krizo okazinta en aprilo 1999.

La sekvaj kunvenoj okazos kiel kutime la unuan merkredon de la monato en la restoracio

Blumeneck, alveno ekde la 19h00, komenco de la prelega programo ekde la 19h30.

**Februaro 2:** Ĝenerala Kunveno.

**Marto 1:** Temo elektota.

## Zürich

